

HERALDO

Eldonantoj: Heroldo de Esperanto, Scheveningen, Nederlando;
Belga Esperanto-Instituto, Antwerpen, Belgio.

Adreso de la Redakcio-Administracio: Harstenhoekweg 223,
Scheveningen, Nederlando. — Redaktoro: Teo Jung.

DE ESPERANTO

OFICIALA SEMAJNA ORGANO DE INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Jara abonprezo: ned. guldonoj 6.80 aŭ egalvaloro; partopago permesita: trimonate gld. 1.70. Unumonata provabono gld. 0.60. Unuopaj numeroj gld. 0.15. — Abono povas komenciĝi en la komenco de iu ajn monato, sed estas finigebla nur post 14-taga antaŭscigo. — Oni bonvolu pagi antaŭe! — Ni akceptas kiel pagon ankaŭ nederlandajn (ne aliandajn) poŝtmarkojn kaj poŝtajn respond-kuponojn: unu respond-kupono egalvaloras al gld. 0.12½.

Anoncoj: unucentimetra kolonero (62 mm. larĝa) kostas gld. 0.60. Rabato laŭ tarifo. — Anoncoj, ankaŭ pri letervesperoj, adresanĝoj, gratuloj ktp. (nur antaŭpago): ĝis 20 vortoj aŭ mallongigoj gld. 0.60; por ĉiuj pliaj 10 vortoj komenciataj po gld. 0.30 pli. Por 3 x enpresado 2-obla prezo. Familiaj anoncoj (edziĝoj ktp.) senpago.

Niaj poŝtekkontoj (ĉiuj funkcias sub la firmo: Heroldo de Esperanto, Scheveningen, Nederlando): Bruselo 2044.04; Budapeŝto 593.79; Gravenhago 1306.30; Kopenhaveno 49.62; Pariso 2050.15; Praha 500.566; Stockholm 41.80; Warszawa 195.926; kaj Zagreb 408.14. Per bankĉekoj oni pagu nur sumojn super gld. 10.—.

N-ro 19 (1024)

DUDEKA JARKOLEKTO

21 Majo 1939

Bern informas: 600 kongresanoj el 24 landoj

Konsiderante la politikan situacion de la lastaj monatoj, la cifero estas preskaŭ kontentiga. Preskaŭ! Sed mankas ankoraŭ vi, kara legant(in)o, kaj mankas ankoraŭ viaj konat(in)oj, en la listo de la kongresanoj. Se ankaŭ vi kaj viaj konatoj estos anoncintaj vin, la cifero estos jam tute kontentiga. Do, ne hezitu! Atendas vin plej agrable restado inter gesamidcenoj el la tuta mondo en tre interesa urbo en la plej bela lando de Eŭropo.

TUJ EKPRENU LA PLUMON KAJ ANONCU VIN!

K. V.:

La bela lingvo

Se sonus en konkursa rondo
Al mi laŭvice tie ĉi
La lingvoj de la tuta mondo,
La gloriplena donis mi
Al Esperanto sen hezito
Kun mia plenkonsentita plej.
Havigu lokon laŭ merito
Al tiu sorĉa florbuked'!

Car el la lingvoj pleje bone
Konataj per mirinda art
En ĝi kunigis belkompone
De ĉiu la plej plaĉa part.
De la latina jen la fundo,
De la itala la belson
Kaj ĉarmaj vortoj en abundo,
De l' franca ege multa bon.

De l' angla jen la artikola
Simpleco sen cerbum-turment',
Kaj kara dono de la pola
La reguleco de l' akcent'.
Jen mia amo kaj fiero
Jam ofte min ravinta tre
Per germana vortkunnet-libro
Por ĉiam nova vorto-kre'.

Kaj tiel plue, tiel plie, —
Jes, mi ripetas kun plezur',
Ke Esperanto prenis ĉi
De ĉio la plej bonan nur.
Al ĝi ankore donu lokon
Kaj helpu vi por ĝia lern'
Kaj sekvu, sekvu mian vokon,
Ke

venu ankaŭ vi al Bern!

Kun la Alpoj kiel fono

Antaŭ la universitato en Bern staras statuo de la svisa poeto kaj nacia barda Albrecht von Haller. Laŭdire li la unua inter la mastroj de l'kanto malfermis al siaj samlandanoj la okulojn por la originala beleco de la Alpoj. Kaj tial oni nomas lin « la kantisto de la Alpoj ».

Sur tiu sama teraso, kiel li turnita al la grandioza ĉeno de la Alpoj en la sudo, mi staris juvespere, kiam la suno roze ruĝaj kolorigis la pintojn de Jungfrau kaj de la aliaj montegoj. Kaj ŝajnis al mi en tiu momento ke nenie en la mondo mi vidis ion pli belan.

Svislando kaj la Alpoj! jen du vortoj kiuj kompletigas unu al alian kiel suno kaj ĉielo, kiel maro kaj akvo. Rigore malvarmaj povas ŝajni kelkfoje la Alpoj, precipe kiam en vintra tago la neĝo pelata de la ŝtormo kirliĝas kiel nebulo ĉirkaŭ ili. Sed eĉ tiam ili konservas sian majestatan belecon, kaj antaŭ la manifestigo de l'natura fortego la eta homo pleniĝas je miro kaj admiro.

Sed nun estas printempo. En plena sunlumo brilegas la pintoj, kaj ĉe la piedoj de la kolosoj floras la ĉerizarboj. Kia lando! Kia naturo!

Certe tamen ne nur la Alpo kreas la senkomparan belecon de Svislando. Ili staras kiel fono por la valoj, por la lagoj kaj por la deklivoj, kie la florantaj ĉerizarboj kaj la verdaj herbejoj dolĉigas la transiron de la malvarmo kaj malmolo tie

supre al la sudeca molo de valoj kaj ebenaĵoj.

De kiam mi konatiĝis al tiu panoramo de la universitata teraso en Bern, mi havis la okazon traekskursi preskaŭ la tutan landon, kaj ju pli mi vidis, des pli grandiĝis mia admiro. Puregajn vilaĝojn mi vidis kun solide konstruitaj domoj el ligno, ĉirkaŭ kiuj vidiĝas neniu signo de malordo kaj apenaŭ de malriĉeco. Gastejoj jen kaj tie laŭ la bonegaj vojoj logas kaj tentas tiom per sia hejmece kiom per siaj propraj el kelo kaj kuirujo. Ah, ili estas originalaj tiuj svizaj gastejoj! Gajaj sed sobraj homoj kun trankvilaj esprimo kaj konduto frekventas ilin, trinkante sian bieron kaj bablante sen ekscitigo en dialekto, kiun fremdulo eĉ konante plurajn lingvojn ne komprenas. Sur la muroj penoas zorge enkadritaj fotoĝrafiaĵoj de kant- aŭ paf-societoj, atestante kiom flegataj estas tiuj du aferoj en tuta Svislando. Kaj kiu konsas la svizojn, tiu scias ke ilia pafemo fontas el paceca amo al la patrujo kaj tute ne el ia militemo.

Carmaj kelnerinoj parolantaj du aŭ tri lingvojn servas vin; la mastro gajmas kaj simpatia venas vin saluti. Ĉio sentigas al vi hejmecon, trankvilon, pacon. Kaj kio alia povus en nuna momento supervalori tiujn tri ecojn!

Fremdulo vojaĝanta en Svislando ekhavas oftajn okazojn admiri ne nur la manifestigojn de l'blindaj naturaj fortoj sed ankaŭ tiujn de l'homa genio. Nur sekvu unu el tiuj multaj asfaltitaj Alpoj, kiuj persiste grimpas ĉiam supren, laŭirante la rokajn flankojn kiel kornicoj super la profundegaj abismoj! Jen kaj tie vi trapasas tunelon, jen kaj tie abismon sur ponto arkitekture gracia kvazaŭ monumento sed tamen fortika. Irante sur tia vojo, vi sentas kiel la longa batalo inter Homo kaj Naturo fine rezultigis en komuna harmonia kaj belplena kreaĵo. Kaj tia kreaĵo estas tuta Svislando! Kia ĝi hodiaŭ manifestigas, moderna kaj laŭtempa, ĝi estas produkto el tiu kunigo de Tekniko kaj Naturo, kiun la svizoj, eble pli ol iuj aliaj, per pacaj rimedoj, interna ordo kaj raciaj celoj atingis.

Tia estas la lando de nia 31-a kongreso. Pacema kaj trankviliga meze en la bolanta Eŭropo ĝi devas ja logi vin, karaĝ gajmekoj. Venu do por vidi, ĝu kaj rimpoz.

A. P.

(Kun la permeso de la redakcio mi klopodas en venontaj artikoloj priskribi ankaŭ la urbon mem de la kongreso kaj doni al vi kelkajn detalojn pri la organiza laboro.)

Nederlanda Kongreskaravano al Bern

Kiel ĉiujare la turista fako de la Nederlanda Esperanto Asocio « La Estonto Estas Nia », v. Tuylly v. Serousskerkenplein 33, Amsterdam Z, aranĝas ankaŭ nunjare komunan vojaĝon al la Universala Kongreso sub gvidado de unu el ĝiaj spertaj membroj.

La partoprenantoj profitas pro tio. Kiel grupo ili gvas rabaton. Car la vojaĝoj okazas laŭ kooperativa bazo, la partoprenintoj poste ricevos la eventuale tro multe pagitan monon.

La turista fako, kiu laboras sub la nomo « Vojaĝ-oficejo L.E.E.N. » funkcias samtempe kiel peranto por la kongreskomitato. Ĝi akceptas mendojn por la kongreskartoj kaj por la hotelrezervado. Tio ŝparas tempon, penon, monon kaj kurdiferencan same al la kongreskomitato kiel al la kongrespartoprenanto.

Pli da disciplino

Demokratio — Aŭtokratio — Disciplino

Oni povus diri, ke demokratio estas tia sistemo, en kiu la povo apartenas ĉu senpere, ĉu pere al la kolektivo kaj en kiu estas la plej fortaj la sendistinge kaj ĉiurilate egaligaj tendencoj. Kompreneble tiu ĉi difino fiksas nur en la plej ĝeneralaj trajtoj la ĉefajn elementojn de ĉiuj demokratiaj sistemoj, kiuj inter si povas pli aŭ malpli diferenci en siaj neesencaj karakterizoj ne nur laŭ tio, ĉu ili estas aplikataj ĉe tiu aŭ tiu popolo, sed ankaŭ laŭ tio, ĉu temas pri demokratia aŭ la politika senco de la vorto, do pri politika reĝimo, en kiu la povo apartenas al la popolo, aŭ pri demokratia kiel agadsistemo de diversaj aliaj kolektivaj unuoj, ekzemple de kulturaj, religiaj, klasaj kaj aliaj movadoj, asocioj, societoj, kooperativaj ktp. Tamen en ĉiu okazo, kia ajn estu la koncerna kolektiva unuo, se ĝia regad- aŭ agad-sistemo bazigigas sur demokratiaj principoj, en ĝi devas la povo aparteni al la kolektivo kiel tute, kaj, por tion atingi, ĝiaj konsistigaj partoj, do la ŝtatanaj, la urbancaj, la civitanaj, la asociaj, societaj aŭ kooperativaj devas esti samrajtaj kaj kiom eble plej egalaj, almenaŭ en la sistemo kiel tia devas regi egaligaj tendencoj.

Kvankam la nun dirota ne rilatas plene al nia temo, tamen estas akcentinde, kaj t'o estas ankaŭ plene natura, ke, se en unu ŝtato regas politika demokratia reĝimo, ankaŭ ĉiuj aliaj kolektivaj grupoj organizigigas plej kutime sur demokratia bazo. Kontraŭe, se la ŝtato estas duon-aŭtokratia, pli aŭ malpli diktatoreca, tamen ene de ĝi povas formiĝi diversaj grupoj, bazitaj sur demokratia. En plene aŭtokratiaj ŝtatoj, kaj precipe en la hodiaŭaj, tio ĉi ne estas ebla, ĉar en ili oni la tutan publikan vivon submetas al la samaj principoj, laŭ kiuj estas regata ankaŭ la ŝtato. Konsekvenco de tio ĉi estas, ke en tiaj ŝtatoj oni, eble, povas havi plej diversajn societojn kaj klubojn, sed kulturajn societojn oni ne povas havi.

La kulturaj societoj estas tiaj homunuigoj, kies celo estas plenumi difinitajn kulturajn taskojn. Tiu tasko regule ne estas konsiderata kiel tre grava aŭ necesa fare de la ŝtategantoj, nek ĝi estas tro populara en la larĝaj popolitavoloj. Tial ĝian efektivecon oni lasas al la privata iniciato, al la opuloj, kiuj por pli efike atingi ĝin organizigas en diversaj societoj. En tiapojaj societoj la opuloj devas pli aŭ malpli doni ĉu materialajn rimedojn ĉu siajn intelektajn aŭ fizikajn fortojn, kaj ili regule ricevas absolute nenian rekompencan, krom eble la morala kontenteco, ke ili plenumas utilan kaj por la homaro necesan taskon, kiu alimaniere ne estus efektivegebla.

Se oni nun konsideras, ke nur la vere demokratiaj sistemoj permesas plenan pensoliberecon, do ankaŭ la opiniliberecon pri tio, kio estas fakte kultura kaj ut la por la tute, dum en la aŭtokratiaj ĉio ĉi dependas de la plene memvola opinio de la t. n. « gvidantoj », estos tuj klare, ke en tiuj ĉi lastaj sistemoj unu grandega parto de la kulturaj societoj jam pro tio ĉi kaŭzo tute simple ne estas ebla. Sed ĉar en la aŭtokratiaj ŝtatoj ĉio, kion la gvidantoj opinias utila por plifortigo de sia povo, do ankaŭ diversaj demandoj el la sfero de kulturo, estas transdonita en la manojn de la ŝtato, tial kulturaj societoj en la vera senco de tiu ĉi esprimo entute ne ekzistas nek povas ekzisti en ili. Krom tio se ili principe eĉ povus ekzisti, ili devus esti bazitaj sur aŭtokratiaj principoj kaj tial neniu volus libervole aliĝi al ili, ĉar neniu volas libervole submetiĝi al ordonoj de unu persono rilate al la aferoj, por kiuj li devas oferi kaj nenian materialan rekompencan ricevi.

Kiel, do, ni vidas, sole la vere demokratiaj politikaj sistemoj ebligas la formigon de plej diversaj, kaj, kio por ni estas

aparte grava, precipe kulturaj organizaĵoj. De la alia flanko nur tiuj kulturaj organizaĵoj, kiuj sian internan vivon starigas sur la principojn de demokratieco, povas bone progresi kaj atingi sian celon; kontraŭe la aŭtokratemo de opuloj aŭ la aŭtokratio kiel sistemo devas ruiniĝi ilin.

Oni tamen absolute ne rajtas intermiksi la vorton « aŭtokratio » kun la vorto « disciplino », kiel ofte tiam faras multaj personoj. Disciplino signifas obeon al certaj reguloj, principoj aŭ decidoj, tute egale kiu kreas aŭ alportas ilin. Sekve disciplino povas ekzisti en aŭtokratiaj same kiel ankaŭ en demokratiaj sistemoj. Tamen inter ambaŭ ekzistas grandega enhava diferenco: la unua estas sekvo de disciplino, la dua de disciplinemo; la unua estas rezulto de la aŭtokratia sistemo, la dua estas fundamenta bazo de la demokratia; la unua estas devige altrudita, la dua libervole akceptita por la bono de la kolektivo. La decidojn, kiujn devas obei disciplinita (aŭ -ema) homoj, alportas en aŭtokratiaj sistemoj la opulo, dum en la demokratiaj ili estas esprimo de plimulto post detala kaj plene libera antaŭdiskuto.

Evidentas kaj klaras, ke precipe en la kulturaj organizismoj, kiaj estas ankaŭ niaj esperantistaj societoj, absolute devas regi disciplino, se oni takte volas atingi pli bonajn sukcesojn. Tiu ĉi disciplino devas signifi ne submetiĝon kaj obeon al ordonoj de tiu aŭ tiu opulo, sed *libervolan akcepton de la decidoj de la plimulto*, kiuj estas kreitaj post serioza, detala kaj plene libera preparo de la decidota afero. Antaŭ la decido oni lasu al ĉiu diri sian opinion, sed post la decido absolute ĉiuj obeu la opinion de la plimulto, ĉar en tia okazo tiu ĉi opinio estas fakte samtempe opinio de la kolektivo kiel tute. La ĵus preparolita obeo ne signifas malfortecon de la karaktero, sed kontraŭe treege grandan forton kaj profunde enradikigitan konscion pri la sociaj devoj.

Resumante ĉion diritan, ni konstatas, ke nur la demokratia kreas konvenan atmosferon por grandkala kultura progreso; ke ĉiuj kolektivaj organizismoj, dezirantaj atingi difinitajn kulturajn celojn kaj plenumi certajn kulturajn taskojn, devas bazigi sur la principoj de demokratieco; fine, ke la demokratia sistemo povas doni bonajn fruktojn kaj entute esti ebla nur en la okazo, se la membraro de la koncerna kolektivo estas disciplineta kaj se ĝi havas antaŭ siaj okuloj ne la individuajn senperajn interesojn, sed la interesojn de la kolektivo kiel tute kaj apenaŭ pere de ĝi la interesojn de si mem kiel konsistigaj ĝiaj partoj.

Disciplinon en la ĵus preparolita senco de la vorto ni sendube urge bezonas ankaŭ en nia movado.

D-ro Ivo Lapenna.

Ĉu « Esperanto nedezirata »?

La aviadistoj urĝe bezonas internacian lingvon.

Lastatempe, la tutmonda gazetaro multe interesiĝis pri la kuraĝa entrepreno de la sovetia aviadisto Kokkinaki, kiu provis transflugi senhalte la distancon Moskvo-Novjorko, Malgraŭ la deviga intertempo, tiu flugo, por la atingita rapideco, signifas treege gravan paŝon al la estonta regula flugo-vojo Moskvo-Novjorko « en unu tago ». Ĉiuj ĵurnaloj, raportante pri la deviga atterigo de la bravaj flugistoj, substrekis, ke oni neniel sukcesis interkompreni kun ili, nek ekscii pri la kialoj de la katastrofo, ĉar la du flugistoj ne parolas la anglan lingvon, kaj la kanadanoj ne komprenas la rusan.

H. G.

Esperanto-Kongresoj 1939

« ESPERANTO-TAGO »

DIUM LA NOVJORKA MONDFOIRO.

S-ro R. M. Pease, la prezidento de la Aranja Komitato de l' 32-a Nordamerika Esperanto-Kongreso, raportas la jenon :

Longan tempon mi esperis konkundi Esperanton en la « New York's World's Fair 1939 » ; sed dum pli ol unu jaro estis neeble sen 5000 dolaroj (tio estas la kosto de la plej malgranda loko por ekspozajo).

La 32-a Kongreso de la Esperanto-Asocio de Norda Ameriko okazos en Novjorko la 1-3 julio. Tialate, mi estas elektita prezidento de la Aranja Komitato kaj, kiel tiu, mi juse povas aranĝi oficiale ke la Fairo nomos la 3-an de julio « Esperanto Day » (Esperanto-Tago). Ni festos tiun tagon kiel eble plej multe. Matene oni senpaga transportos ĉiujn anojn de la kongreso de la Kongresejo (New Yorker Hotel) en la Fairground kaj atentigos ilin pri la intereso de la Fairo ĝis tagmezo. Ĉiuj manĝos kune en la restoracio de la Svislanda Domo. Posttagmeze okazos granda publika kunveno kun bela programa de internacia karaktero, taŭga por Esperantismo. Vespere estos grandioza festo, la klimaks de la kongreso, en la Winter-Wonderland-restoracio de la Fairo.

(Estas, do, rekomendinde ke tiuj samideanoj, kiuj intencas viziti la Mondfiron, t. e. la Universalan Ekspozicion de Novjorko, aranĝu ĉeesti la 32-an Kongreson de EANA kaj la « Esperanto-Tagon » je la 3-a de julio. — Adreso : Local Congress Committee, H. W. Smart, 147 So. Oxford Street, Brooklyn, N. Y.)

15-a KONGRESO

DE ORIENTFRANCA FEDERACIO.

Ĝi okazos la 11-an de junio en Saverne, sub la honorprezido de la urbestro, en la salonoj de la urbestro. La malferma kunveno estos disaŭgdata de Radio-Strasbourg je 9.30-10.00 MET kaj somera GMT. Post la festeno, kiu estos en Hotelo de la Gare, la kongresanoj ekskursos al Hobbach, pitoreska loko en la ĉirkaŭaĵo de Saverne.

Oni povas sin turni al jena adreso : S-ro Marcel Zimmermann, 10, rue des Abeilles, Colmar (Ht.-Rhin).

BALTLANDA

ESPERANTO-KONFERENCIO.

Litova Esperanto-Asocio invitas al vizito de la Baltlanda Esperanto-Konferencio, kiu okazos en la kadro de (Reesperantista) Balta Semajno kaj de la Jubilea Kongreso de Litova Esperantistaro, en Kaunas, la ĉefurbo de Litovio, en la tagoj 9-11 junio. Oni esperas ke ankaŭ multaj latvaj kaj estonaj gesamideanoj partoprenos.

Adreso : Litova Esperanto-Asocio, Zemaitiu g. 15, Kaunas.

Internacia Semajno en Nederlando

La turista fako de la Nederlanda Esperanto Asocio « La Estonto Estas Nia » aranĝas en ĉi tiu jaro denove 8-tagan restadon, kiu okazos de la 6-a ĝis la 13-a de aŭgusto en Amsterdamo.

La programo enhavas interalie la jenajn vizitojn : Volendam kaj insulo Marken, la granda mardigo en la Zuiderzee, fromaĝfoiro en Alkmaar, papcalaco en 's-Gravenhage, banurbo Scheveningen.

Ĉiuj kosto (hotelo, manĝoj, ekskursoj, trinkmono) estas guld. 55.—

Petu la senpagan detalan programon de : Vojaĝ-oficejo de L.E.E.N., v. Tuyl v. Serooskerkenplein 33, Amsterdam-Z., Nederlando.

ĈIU DEVAS KUNHELPI !


Balasto kaj manko

Sub la titolo « Kubutlibrecon ! » aperigis Heroldo en sia numero 26 (982) de 3.7.1938 artikolon de sia redaktoro, kiu certe interesis multajn legantojn. El ĝi parolas la sperto de longtempa praktikulo, la sperto de profesia esperantisto. Ĝi montras al ni, malgraŭ la natura evoluo de nia lingvo, dependas de ni mem, « kia » ĝi fariĝas.

Plej gravas, miaopinie, la problemoj pri la neologismoj, kaj estas dezirinde, ke oni baldaŭ serioze ekapu, anstataŭ jaron post jaro senfrukte polemiki.

Temas do pri energia kaj tuja agado de neologismoj kaj celoj, konstanti ĉiujn sentulajn neologismojn kaj rekomendi ties neuzon, kaj, aliflanke, konstanti, por kiuj nekontentigaj esprimoj ni deziras neologismojn, kaj rekomendi ties uzadon.

Ke malgraŭ la multaj sentulaj neologismoj, tamen, aliflanke mankas esprimfortaj radikoj, tion pruvis Zamenhof mem. Ili uzis en sia verkaro tiel multajn neologismojn, ke eĉ hodiaŭ amasego da ili ankoraŭ ne estas oficialigita. Jen malgranda, uzinda kolekto ne-oficiala sed pli kaj pli uzata : aĵo, grego, drato, anaso, asketo, matrono, megero, farbo, filistro, bufro, gildo, inkono, kaskado, listelo, sino, remizo, renegato, sablono, strika, drasta, mucida, perverosa, pruda, sangvina, sporada, susuri, spili, ornato, represi, likona, kuerti, kvakli, kupli, koncesii, kompleksa, kompakta, kaperi, inkustri, graki, generi, arogi, ŝninkli, taŭzi, transversa, ŝakto, ĉirpi, blufi, blagi, aŭguri, mistifiki, strebi, treti, ŝrumpi, ktp. (Oni bonvole pristudu ilin en la Plena Vortaro, kiu nun devus posedi ĉiujn konscia esperantistoj, aŭ almenaŭ ĉiuj grupo. Intertempe



Tiuj, kiuj ĉeestis la Kongreson en Londono, kiam nia amata amikino, Margarete Saxl, tiel neatendite forpasis, memoros ke oni faris monokoleton por pagi la koston de la enterigo kaj por ebligi la starigon de konvena memoriga ŝtono super sia tombo en Hendon Park Cemetery, Mill Hill, Londono. Ĉi tiu monumento estas nun en sia loko kaj ĉi-sube estas fotografajoj de ĝi. Por la informo de tiuj, kiuj deziras viziti ĝin, la numero de la tombo estas 46310.E11.

Sur la monumento troviĝas, sub ŝia nomo kaj mortotago, la vortoj :

« Talento mirinda, gojplena koro :
Kun amo ŝi restos en ĉies memoro. »

I.E.L. estas ricevinta nun preskaŭ precize la sumon necesan pro la enterigo kaj pro la monumento. Dum la Paskaj Kunsidoj de la Estraro, oni decidis daŭrigi la kolekton por havigi sumon sufiĉe grandan por pagi la koston de prizorgo kaj purigado de la tombo kaj de la plantoj sur ĝi ĉiam. La kosto por tio estas £69, kaj ni estas certaj ke multaj el la gemikoj ĉiulandaj de Margarete Saxl volonte sendos tiucele tiom, kiom ili povos, por ebligi la plenumon de tiu plano. Oni povas sendi donacojn al ni ĉe ĉefdeligitaj kaj Perantoj aŭ rekte al la Centra Oficejo de Internacia Esperanto-Ligo, Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo.

La Esperanto-Semajno en Barry

Dank' al la iniciato de la Esperanto-Grupo de Barry (Glam.) kaj de la Esperanto-Federacio de Suda Kimrujo kaj Monmouth, okazis en Barry de la 7-a ĝis 15-a de aprilo perfektiga kurso, gvidita de s-ro Pragano. Gais la kurso 25 kursanoj, ne nur de la regiono sed ankaŭ el Newcastle, Southend, Bishop Auckland, Oxford, Chester, Leeds, Temis ne nur pri gramatikaj problemoj sed ankaŭ pri la historio de nia movado kaj pri la Esperanta literaturo. La prelegoj okazis dum la matenoj; ekskursoj posttagmeze ; vespere ludoj kaj teatraĵoj.

Esperantistoj en aliaj regionoj de nia lando devus imiti la ekzemplon de Barry kaj starigi perfektigan kurson, gvidotan de s-ro Pragano, kiu estas eminenta esperantisto. Estas malfacile imagi ke li povus paroli pli flue kaj pli elokvente en sia propra lingvo.

La partoprenintoj dankas kore la samideanojn de Barry ke ili ebligis tiun sukcesplenan, gviditan kaj profitan kurson, kaj multe esperas ke oni aranĝos similan kurson en Weston-super-Mare, tuj post la Brita Kongreso dum pentekosto.

F.L.E.-Kongreso en Arnhem

Paskon okazis en Arnhem la 24-a Kongreso de la Federacio de Laboristaj Esperantistoj en la teritorio de la nederlanda lingvo. La kongresanoj akceptis kaj alparolis en la urbodomo la urbestro s-ro Bloemers, 900 personoj ĉeestis la interfratigan vesperon ; 611 alĝuis al la kongreso.

El la malferma parolado de la kongresa pre-

zidanto, k-do Veen, ni citas jenajn vortojn :

« La pasinta jaro ne montris sin favora al progreso de Esperanto, ne nur en la Federacio, sed ankaŭ ĉe ĉiuj aliaj organizoj. Esperanto konformiĝas al plej alta idealo, la paco. La nuna militdanĝera tempo grave influas. Esperanto ja pli bone povas disvastiĝi en paca sfero. Ni tamen konsciu, ke nia energio, distinita en la nuna prema tempo al nia movado, poste des pli efikas. Kiam la tempo torĝos, nia kolektiva energio ebligos la venkon de Esperanto. »

La kongreso de FLE denove pruvis la forton de tiu ĉi organizo, pri kiu akiris plej grandan meriton ĝia antaŭa prezidento, s-ro Faulhaber, nun elektita de la kongreso kiel honora prezidento de la Federacio.

En la venonta jaro la FLE-kongreso okazos en Amsterdamo.

«La bela lingvo»

Niaj legantoj certe divenos, aŭ jam divenis, kies talento sin kaŝas modeste malantaŭ la literoj K. V. kaj kiu do estas la verkinto de la trafa versajo publikigita sur la titoloĝaj de la hodiaŭa numero. Li anticipas permesas la reponon kaj deklaman de tiu ĉi propaganda poemo. Post paso de la Berna Kongreso oni povos la lastajn kvar liniojn sanĝi jene :

Al ĝi pro tio donu lokon
En viaj koroj pli kaj pli
Kaj multobligu mian vokon :
Plej bela lingvo estas ĝi !

infano, vestita per mallonga ĵupeto, kiu nur duone kovris ĝiajn mallortajn gambetojn. Pli bela estas : Sur la streta ponto staris la infano, vestita per kurtaj ĵupeto, kiu nur duone kovris ĝiajn feblajn gambetojn.

Per tiaj vortoj oni nek malfaciligas nek endanĝerigas la lingvon kaj ne agas kontraŭ la Fundamento, same kiel ne faris tion la endukado de multaj bonaj vortoj, kiuj jam estis neologismoj, ekz. : roko, amara, ŝvebi, flustru, milda, stulta » ktp., por kiuj ni pli frue nur havis : « ŝtonego, maldolĉa, flugpendi, murmuri, malakra, malprista ».

Cetero, kiu preferas la mal-vortojn, tiu ja transvivu povas uzi ilin, ĉar ili ne perdis siajn sencojn. Oni eĉ povus diri : « maligna, mal-sure, maltago, malfermi » ktp. — tiaj vortoj ne estas malpli klaraj kaj logikaj ol « malsupre, mallarĝa, mallonga, malforta, maldekstra, malfermi ».

Rigardante la nunan evoluo-stupon kaj ricevon de nia lingvo, oni povas miri, kial ĝis nun ĝi ne altiĝis super la malmultaj, sed pro ĉiunomanta uzado tiel okulfraj signoj de malriĉo, certe ne allogaj al serioza studado. Ne mirinde, ke eĉ simpatiantoj iufoje nomas Esperanton « surrogata lingvo ».

Krom la potenco de kutimo, regas eble ĉe ĉiuj la timo, ke ĉiuj post ĉiuj povus enpenetri novaj radikoj por ĉiuj mal-vortoj. Tio opinio estas tute senkaŭza, ĉar explore komparante Esperanton kun nacia lingvo, oni konstatas : Eĉ se ĉiuj post ĉiuj endukindus neologismojn por ĉiuj mal-vortoj, kiuj en nacia lingvo ne estas formeblaj per prefikso, ili entute estas ne pli ol kvardek. Do, eĉ ekstremokaze nenia danĝero minacas.

Lingva Komitato kaj Akademio principe ne endukindas neologismojn, sed nur oficialigas

Gazetoj pri Esperanto

La Patrie Annamite, Hanoi, 3.12.1938 kaj 13.3.1939. Ambaŭ numeroj kun ampleksa (plur-kolona) informaro de la Hinduĉina Esperantista Asocio, kie oni legas ankaŭ ke la grava jurnalo Hanoi-S-ir ĉiutunde enhavas ampleksan Esperanto-parton

La Patrie, Bruges, Belg., 29.4. Publikigas (en Esp.) la alvokon de la IEL-estraro al la gesperantistoj.

Portobello Advertiser, Portobello, Skotlando, 10.3. Ĉi tiu jurnalo enhavas Esp.-rubrikon, redaktatan de J. F. Souter. (En ĉi tiu numero estas i. a. artikolo pri Heroldo, okaze de ĝia 1000-a numero.)

Cinifilo, Lisboa, Port., 21.4. Kun dupaĝa artikolo pri « Esperanto kaj kinematografio », pri la intervjuo de s-ro Scherer kun s-ro Clarence Brown, kaj bildo de la fama reĝisoro kun saluto al la esperantistoj.

Hrvatski List, Osijek, Jugosl., 24.4. Raportas pri jarkunveno de Esp.-soc. « Verda Stelo » en Osijek.

Nemzeti Ujság (Nacia Gazeto), Budapest, Hung., de nun publikigas ĉiutindmanĉan Esp.-angulon, redaktatan de D-ro V. Montano.

Esperanto en Radio

« EN PROVENCIO »

« Pri Alphonse Daudet », antaŭ du semajnoj, kondukis nin al la franca provinco nomita Provenco (sude de Franclando). En tiu bela regiono ni estos denove, venontan lundon, kiam Radio Paris PTT, je 22.45 MET kaj somera GMT dissendos skeĉon « En Provenco ». Ĉi tiu skeĉo estas originale verkita en Esperanto de Jacques Manceau kaj entenas folklorajn kantojn, adaptitajn al Esperanto de René Deshayes kaj André Remond.

La provinco konsistas el du partoj ; enlanda, kaj marborda ; en tiu ĉi lasta troviĝas la fama havenurbo Marseille (pr. marsej'). La skeĉo pritrakas la enlandan parton de Provenco ; nova dissendo, post kelkaj semajnoj, montras la marbordan parton kaj la urbon Marseille.

Aŭskultu la skeĉon, kaj skribu al : Courrier des Auditeurs, 107 rue de Grenelle, Paris. Ne forgesi ke oni organizis konkurson kaj, se via letero estos elektita — ĉu pro lerta kritiko, ĉu pro bonaj sugestoj — vi povos ricevi premion. Cetero, vi ĝuos la plezuradon aŭ senperan respondon al vi, per la voĉo de la mikrofono, dum postea dissendo.

La 29-an de majo vi aŭdos radioscenojn pri la Franca Revolucio, s. t. « Majo 1789 », de André Remond.

ATENTU ! — BAGHY-VESPERO !

Radio « Danuba Voĉo », VIII., Sándor-ucca 7, Budapest, Hungarujo, denove ĝojigos la esperantistaron per dissendo de Baghy-Vespero dum 25 minutoj. Ĝin dissendos Budapest II, dimanĉon la 4-an de junio, je 20.45-21.10 MET kaj somera GMT. Ĉiu amiko de la Baghy-poezio jam nun notas tiun daton kaj horon sur sia kalendaro, por ne forgesi aŭskulti — kaj poste raportu aŭ danki al la stacio.

RIFUĜONTINOJ

Ni informis en antaŭa numero, ke ni havis bonan sukceson trovante laboron por rifuĝintoj, kiuj estas tretaj veni al Anglujo kiel domservistinoj, ktp.

Ni nun devas informi pri novaj reguloj de la brita registaro pri tia enmigro. Virino, kiu deziras enmigri tiucele, devas esti inter 18-jara kaj 45-jara ; krome ŝi devas esti fraŭlino, vidvino aŭ ekzeldzino. Se ŝi estas edzino, la « Home Office » nun donas permeson, se ŝia edzo jam estas en Anglujo.

I.E.L., Rickmansworth, Anglujo.

ilin post ĝenerala uzado. Natura evoluo, tute ĝuste !

Do, se ni bezonas certajn neologismojn, ni devas senhezite uzi ilin, por ke ili havu okazon pruvigi en la praktiko.

Sekve, krom la Plena Vortaro, ni bezonas kompetentan instancon de almenaŭ tri diversnaciaj, kiuj bonvole interkonsente elaboru liston pri la ĝis nun uzata (aŭ ne uzata) sentulita balasto forlasenda, kaj kiuj, aliflanke, rekomendu la necesajn novajn radikojn. Tiu « kompetenta instanco » devus esti tiuj plej famaj verkistoj aŭ redaktoroj.

Tre necesaj ŝajnas la maloj de « dika, granda, bona, dekstra, fermi », kaj ankaŭ ia radikoj por indiki ke oni ne plu retrovas ion kion oni antaŭe havis (germane « vermissen »). La nuna uzado de « eta » por eviti « malgranda » ofte ne diras la klaran malon, sed tre bone taŭgas por esprimi nuancan.

La plej grandan ŝancon, rapide vivantiĝi, havus unusilabaj radikoj, kondiĉe ke ili perfekte harmoniu kun nia lingvo. Kontraŭe, neologismoj pli longaj ol la koncerna mal-vorto, versajne neniam definitive enpenetras.

Nesuperbele konvenaj kaj ankaŭ por la ĝenerala uzado tuj aplikindaj ŝajnas al mi la maloj (prezenti) el « Parnasa Gvidlibro » de K. Kalocsay kaj G. Waringhien) de « forta, mola, supra, longa, rapida, sana, utila, juna, diligenta, gracia, larĝa, grasa, frua, goĝa, bela, alta » ; do : « febla, dura, infre, karta, lanta, morda, noĉi, olda, pigra, plumpa, streta, magra, trarda, trista, turpa, basa ». Pliajn vortojn oni bonvole pristudu en la mencita libro.

Ni esperu ke baldaŭ plenumiĝos nia arda deziro, ke « nia lingvo estu plejlebe perfekta, klara, simpla kaj bela ».

Georg Sieche.

HOLLYWOOD

Joseph R. Scherer

De tempo al tempo kelkaj gesamideanoj plendis ĉe mi ke ofte filmoj el Hollywood ne estas amuzaj, aŭ estis tro amuzaj aŭ ke mankis vera enhavo aŭ ke ili estis nemoralaj.

Estas vere ke ne ĉiuj filmoj el Hollywood estas bonaj. Same ne ĉiuj filmoj el alilandaj filmfarejoj estas bonaj.

Tamen Hollywood donas al la mondo multajn bonegajn kaj valorajn filmojn. Ne ĉiuj filmoj estas bonaj — kelkaj estas multe pli malbonaj ol estis la plej malbonaj filmoj iam faritaj. La saĝa homo pro tio ne rifuzas legi librojn entute.

Oni devas do elekti inter la plej bonaj libroj kaj filmoj. Kial forjeti sian valoran tempojn legante malbonajn librojn kaj vidante senvalorajn filmojn?

Por helpi al la legantoj de « Heroldo » en la malfacila decido, ĉu viziti multe reklamitan filmon aŭ ne, mi komencos verki mallongajn film-recenzojn. Mi klopodos gajni la fidon de la gesamideanoj ĉiam dirante mian objektivan opinionon.

Kelkaj filmoj estas vere grandiozaj laŭ fotografa vidpunkto; aliaj estas trege interesaj laŭ enhavo, aliaj estas amuzaj aŭ tragikaj; kelkaj filmoj montras historiajn okazintaĵojn, aliaj malproksimajn landojn. Mi indokos per stiletaj mian opinionon pri la valoro de la filmoj: 5 steloj ***** eksterordinara filmo; 4 steloj **** tre bona filmo; 3 steloj *** interesa kaj kontentiga filmo. Filmoj, kiuj estas tiel klasigitaj de mi, meritis viziton de ĉiu serioza homo. Mi kredas ke neniu samideano estos malkontenta post tia vizito al la kinejo.

Mi ne kapoblas viziti persone ĉiujn filmojn. Pri tiuj filmoj mi devas dependi de la opinioj de 3-4 usonaj filmrecenzistoj kiuj dum la lastaj 15 jaroj neniam seniluziĝis min. Tamen la plej multajn klasigitajn filmojn mi mem vizitis.

Saĝa homo malofte komencas legi libron, se ĝi ne estas bone recenzita aŭ forte rekomendita de amiko, al kies opinio li povas fidi. Estas ja tro multaj bonegaj libroj! Mankas la tempo por legi ĉe ĉiuj. Same estas tro multaj bonegaj, unuaklasaj kaj valoraj filmoj. Neniu utila homo kapoblas vidi ĉiujn!

Filmoj grandmezure instigis min fariĝi

PRINCO WILHELM :

FILO al PATRO

(Fino.)

Sed ĝi pruvas ankoraŭ pli : vian kompaton al la malfeliĉuloj, kaj siaflanke tiu devenas de via bona koro. Vi ne kapoblas vidi la suferojn de aliaj, ne provante mildigi la turmenton, kaj vi ĉiam estas preta etendi helpantan manon tien, kie vokas la misero. Tamen estas mirinde ke oni nur tre malofte aŭdas pri tio — aŭ pli ĝuste dirite — tute ne estas mirinde, kiam oni scias ke vi ne deziras publikigi tiajn aferojn. Silente vi tiam faras, ĉar la vera kompatado estas mallaŭta kaj hezitema. Same kiel vi mem ĝi ne amas la fanfaronajn vortojn. Vi tiurilate tiom silentas, ke eĉ ni, la viaj, ne scietas la amplekson de viaj multaj agoj de amo, ni nur scias ke ili estas legio, etendigitaj de Ystad ĝis Karesund. (Plej suda kaj plej norda urboj de la longa Svedlando. Rim. de la trad.) En miloj da malriĉaj hejmoj oni benas vian nomon.

La bonecon de via koro ni ĉiuj spertis. Vi malfacile neas, se oni sopire petas pri io; vi facile konvinkigas, se vi opinias doni ĝojon per tio. Sed kiu trude postulas aŭ fariĝas obstina, li tute malsukcesas, neniu povus vin devigi al io ne aprokata de vi. Ĉiun apartan kazon vi deziras ekzameni, rezervante al vi mem la finan decidon. Poste, kiam vi decidis, nenio kapablas igi vin ŝanĝi. Se tiu « persistence », jam trovbla ĉe pluraj el ni familianoj, eble estas heredo de la kara Jean Baptiste kaj lia historie konata « caractere opiniatre », via neŝancebla fido al viaj promesoj rekompence estas tiom pli sveda. Dirite estas dirite. Tiukaze vi ne konas kompromison, tute simple ĉar vi neniam kontraŭagas vian konvinkon. Tio estas Vasa en multe pli alta grado ol Bernadotte. Sveda ĝis la pintoj de la fingroj.

Samkiel vi estas fidela al via vorto, vi ankaŭ estas al viaj amikoj. Se vi amikiĝis al iu, tio validas por la tuta vivo, mi ne scias kio povus tion ŝanĝi. Tiam vi montras senlaman paciencon. Via indulgemo al la eraraj kaj mankoj de aliaj estas tiom rimarkebla trajto, ke ĝi kelkfoje fariĝas preskaŭ kortuŝa. Al ĉiuj vi deziras feliĉon kaj ĉiam vi komencas per bonfido al ĉiu homo, unue vi atentis liajn meritojn, nur due liajn malfortojn. Per aliaj vortoj, via konduto estas eksterordinare amika kaj kompleza al ĉiu, kies vojo kruciĝas kun via, oni povus nomi tion kredemo, sed tiukaze de la speco ne kondukebla je la nazo. Ĉar fakte oni ne facile surprizatakas vin, kontraŭ tio vi tro spertis en la vivo kaj tro funde konas la homojn. Se oni ne kulpiĝus pri tro kolrompa paradokso, oni emus diri ke estas ia malfida fido. Unuopaj la vortoj erariĝas, sed kune ili tamen esprimas ideon, kiu almenau parte konceptigas, pri kio temas. Cetere tute natura sinteno de tiu, kiu ĉiutage, ĉiunmomente devas atenti siajn vortojn kaj agojn.

Ĉar dum via tuta vivo oni ĉiam severege observis vin, eĉ tiomgrade ke nur viaj plej proksimaj havas vian ideon pri la peza sento, k. un povas doni tio. Ne estas facile al homo sidi en vitra domo, preskaŭ ĝi estas nomebla anima torturo, precipe se — kiel bedaŭrinde okazis — oni malkomprenis liajn plej honestajn intencojn kaj falsis liajn agojn. Tiam oni bezonas pli ol ordinare troveblan volforton por ne esti venkata, falante en apatian letargion aŭ por pura malspera spito farante neprenisitan agon, kiun oni poste devos penti. De ĉio tia vin savis via saĝa modero, ambicio kaj nekonruptebla fido al la devoj. Precipe la lasta. Mi kredas ke eĉ la plej pedanta paragraf-randanto al la plej acchidumora kverelulo ne kun bona sciencio povas tion kontraŭdiri. Tiurilate via vivo estas to tre unika kaj mirinda de aliaj. Ĉion vi oferis por via vivtasko, bone sciante ke la unua gvidanto de popolo samtempe nepre estu la unua servanto de la popolo. Jen kio al vi fariĝis la esenco, kio fariĝis grava, sur kio vi de la komenco koncentriĝis, kio pretendis vian vivon, jen viaj pensoj kaj devoj.

Kaj iom post iom la miraklo okazis. Ne plu vi sidis en domo el vitro; ĝiaj muroj falis, malaperis, degelis per la varmo de io nova, kio komencis ĉirkaŭbrili, ardiĝi ĉie. Io kio tiom mirinde bonfartiĝis la animon kuŝante kvazaŭ kotono ĉirkaŭ la koro. Io kio miloble kompensis vivolongajn servojn kaj oferon. Io granda, b. la, riĉa : la amo, danko, fido de tuta popolo. Amo, ĉar vi estis tiu kiu vi estis; danko por tio, kion vi faris; fido al tio, kion vi faras.

Okazis kiel en la fabeloj. La vitra domo ŝanĝiĝis en grandiozan salomon, senlaman kun ĉielalta plafono. Tie vi ĉirkaŭpaŝis kiel bona sperta mastro, al kiu ĉiuj portis siajn zorgojn, de kiu ĉiuj petis konsilojn, certaj ke vi ilin renkontos kun kompreno. Kaj tie vi hodiaŭ kiel honora gasto sidas ĉe trege longa tablo, etendigitanta de Smygehus ĝis la plej ekstrema norda limŝtonaro kaj ornamita de la hela somera verdo. Tiu salono estas al vi kaj ni ĉiuj la plej bona de la tero, kaj en la jaroj ĝi iom post iom ek-

havis nomon, same belan kiel karakterizan : la popolhejmo Svedlando.

Nun vi jam demandas vin, kio estas al mi, ĉar mi skribis tian longan, strangan leteron. Eble vi trovas ĝin nebezona, ĉar hodiaŭ vi certe aŭdos proksimume la samon ripeti de mil diferencaj direktroj, verŝajne en pli bona, pli fidinda maniero ol povis mi. Sed mi volas respondi, ke ĝuste tio estas la kaŭzo. K. am nun estas tiel, ke vi havas filon elektintan la plumon sia paca batalilo, ŝajnas al mi sencekse kaj nedanke, ne kapti la rajton saluti per ĝi samkiel la ceteraj verkistoj. Kial ĝi ĝuste je tago kia tiu ĉi restus neuzata, kvazaŭ ĝi hontus aŭ dezirus sin kaŝi pro neklara kaŭzo? Tia faro estus perfido al la devo.

Ankoraŭ kaŭzon mi havas. En nia familio ne ekzistas kion oni iom vulgare kutimas nomi : Societo de reciproka admiro. Kiam ni kunvenas, male okazas ke ni sufiĉe akre kritikis unu la alian, kaj trovante nenion por kritiki, ni silentas pri niaj sentoj. Kion mi havas sur la koro, mi tial dirigis la plumon, almaniere tion diri mi neniam povus decidiĝi, eĉ ne se tempo kaj ceteraj cirkonstancoj tion permesus.

En tiu momento mi ekrimarkas ke mi forgesis la plej gravan de gratuletoj : la « gratulon ». Ne pardonebla malforgo — sed ankaŭ kia terura vorto! Ĉu pli belsonas « bondeziro »? Malmulte; preskaŭ ĝi estas same banala, nenion diranta, ĝisnaŭze remaĉita, ke oni preskaŭ ne emas ĝin atenti. Sed bedaŭrinde la lingvo ne havas pli bonan, kaj ĝi do staru tie ĉi laŭpove paradante.

Ĉiu homo hodiaŭ uzos tiun vorton por viaj okdek jaroj. Okdek estas ronda kaj sufiĉe granda nombro, kiun la opinio priatentis. Sed en la ekzisto nombro per si mem nenion signifas, ĝi nur montras mejloston, sufiĉe laŭplaĉe lokitan por nia amo al la decimala sistemo. Ĉio dependas de la farto kaj animstato de tiu, kiu preterpasas la ŝtonon — precipe se la fina celo ankoraŭ sin kaŝas en forta malproksimo. Kuranto antaŭen stumblanda kun eluzitaj fortoj, bruspiraj pulmoj kaj senkuraga animo ne estas tro glora afero, li maksimume ekvekas kompaton.

Tial mi vin gratulas, kara patro, ne en unua vico por la okdek jaroj, sed pro tio ke ĉiam ankoraŭ vi restas same sanega, vivplena, preskaŭ knabe vigla, kiam vi estis la tutan vivon, pro via kaj animo kaj korpe fenomenata farto, pro viaj juneco kaj freŝeco, pro tio ke vi estas vian homo inter aliaj homoj kun ambaŭ piedoj sur la firma tero de la realo kaj kun ne malpliigitaj malsato de la vivo. Jen la ĉefajo.

Mi nun finas per la espero, ke mi post dek jaroj povos alporti tiun ĉi leteron trovante ĝian enhavon same valida kiel hodiaŭ, nur ŝanĝinte kelkajn erarigajn okojn en naŭtojn. Kaj por ke mi ne ŝajnu al vi tro multvorta kaj serioza, mi volas — tute inter ni — aldoni mian propran opinionon pri vi. Tio ekkluziva ĝi estas ke ankoraŭ nur unu povas ĝin havi, kaj por ke ĝi plene komprenigu sin, ĝi estu esprimata per la helpiloj de la moderna lingvo. Ĝi tute simple tiel aspektas : ke vi estas la paĉjo, la paĉjo de ĉiuj tempoj.

Via propra

Wilhelm.
Laŭ permeso de la verkisto esperantigis
Signe Boye.

STÉPHAN ZODEL :

Ĉu esti malŝanĝema ?

La vorto « lila » en la germana lingvo esprimas la stringoviolan, ruĝtbluan koloron.

Preskaŭ mi estis jam plenkreskulo, kiam mi — tute hazarde — konsciĝis, ke por mi tiu ĉi vorto ĉiam esprimis la helbluan koloron. De post miaj infanaj jaroj mi do havis malĝustan imagon pri la signifo de la nomita vorto.

Tuŝis min strange, kiam mi devis fari la konstaton pri mia tiom longjara eraro. La vorto kaj ties signifo estis jam tiel enradikiĝintaj en mi, ke mia tuta mio komence ribelis kontraŭ la farita konstato, des pli, ĉar la imago, kiun donis al mi la vorto, fariĝis firma nociĝ en mia cerbo.

Mi sentis la neceson de la korektao de mia ĝisnuna erara opinio kiel atakon, kiel perforton. Sed la prudento finfine multigis ĉiujn internajn voĉojn. Vole-nevole mi kapitulacis kaj agnoskis la vorton « lila » kiel esprimon por stringoviola, ĉar mi ja ne povis postuli, ke la tuta germana popolo subite ŝanĝu pro mi sian imagon pri tiu ĉi vorto.

Iom ridinda afero, ĉu ne? Ŝajnas tiel. Iu, kontrolu vin atente! Ne estas tia malfortaĵo kiel ni unuamomente opinias, ke la sperto, la realeco devigas nin, disigi nin de firmaj opinioj, kiuj ŝajnis esti kolonoj aŭ masivaj blokoj de nia spirita konstruaĵo « mondpercepto ».

Kiam la realeco aŭ la prudento atentigas nin pri la neceso de ia ŝanĝo en nia mensa mazaiko, tiam ni ne obstine kontraŭstaru, ĉar konsekvence ignori tiajn konstatojn signifiĝas, resti nepra konservativulo, kaj tio egalas — spiritan ŝtonigadon.

Penso por la monato

Estas kvazaŭ multaj vojoj al la pinto de la monto — la Vero. Unuj supreniĝas per flugiloj de la fido; unuj supreniras per helpo, kiel sur kabla fervojo; aliaj supreniras iom post iom, farante soseon dum ili iras, por ke aliaj sekvu! Ĉi tiuj estas la sciencistoj. En la fino, sendube, ĉiuj atingos de la pinton, aŭ tion kio ŝajnas la pinto. Nuntempe ĉiu eble opinias, ke la alia estas malprava; ĉiu eble kredas, ke lia vojo estas la sola, sed tiuj diferencoj kaj diverĝoj ĉesos, kiam ni trovos, ke de la komenco ni celis la saman rezulton, — ke la Vero estas unu; kaj ni verŝajne renkontiĝos ĉe la pinto kaj premos la manon unu de alia.

SIR OLIVER LODGE.

globletrotulo, verki librojn, fari lumbildparoladojn ĉirkaŭ la tuta mondo, propagandi Esperanton kaj laŭ mia malgranda kapablo servi al la plibonigo de la homaro pere de neŭtrala lingvo.

Bonaj filmoj same multe influis mian vivon kiel la plej valoraj teatraĵoj kaj libroj.

Kio estus la mondo hodiaŭ sen la filmo? La filmarto estas hodiaŭ same valora kiel la presarto. Filmoj same influas la homamasojn kiel libroj, radio, ĵurnaloj. Fakte multaj homoj, kiuj malofte legas libron, multe lernas pri la mondo irante al kinejoj. Ni povas sidi en kinejo en la plej perditita vilaĝo ie en la mondo, kaj ni povas vidi kiel vivas la eskimoj en la nordo, la negroj en Afriko, la usonanoj, la sudamerikanoj, la hindoj... la loĝantoj en grandurboj, kaj la kamparanoj en Ĉinujo. Ni aŭdas ilian muzikon, ni travivas iliajn ĝojojn kaj dolorojn. Filmoj montras tion ĉion al ni multe pli bone ol tion povus klarigi libroj.

Ni vidas kiel venkas sportistoj, kiel kroniĝas nova papo, kiel revenas Howard Hughes de rapida aera mondovojaĝo, aŭ kiel dormeme sin balancas la altaj palmoj sur Cejlono en tropika venteto sub arĝenta luno. Ni vidas kiel devas batali sukcesaj homoj kiel Emil Zola, Pasteur, Curie kaj multaj aliaj. Ofte mi venis hejmen kun la firma decido lerni pli multe, kaj labori pli forte por sukcesigi mondpacajn ideojn kaj idealojn.

Do en venontaj artikoloj sekvos informoj pri la plej bonaj filmoj el Hollywood kaj kelkaj personaj spertoj kun filmsteloj.

Malgaja printempo

Kaj malaperis mia rido...
Foriris ĝi de longa tempo,
Foriris ankaŭ mia fido
En vivon, kvankam la printempo
Ĉirkaŭe regas, suno brilas,
Stringoj floras — belodor' ;
Kvankam la birdoj gaje trilas, —
Sed mia, ho, doloras kor'...

Doloras koro, kaj animo
Serena mia en mantel'
De malgajeco kaj deprimo
Similas sur' al mortkandel'...
Kaj en la urbo miliona
Solecon sentas mia kor' ;
Forta turmentas min doloro,
Kaj rido mia estas for'...

Halma Weinstein.

Du anekdotoj

LI NE SATIS PAROLADOJN.

La konata germana humorista pentristo kaj poeto Wilhelm Busch tre malsatis longajn paroladojn. Okaze de la 70-a naskiĝotago liaj amikoj kaj adorantoj aranĝis por li festenon, dum kiu estis farataj multaj tostoj kaj paroladoj.

Busch pacience aŭskultis, dume malplengigante sian glason. Iu flustris en lian oreilon, ke ankaŭ li nun devas ion diri.

La jubileulo suspiris, ekstaris, tinte batetis per kulereto kontraŭ sia glaso kaj, kiam ĉies okuloj atenteme estis direktitaj al li, li vokis : — Kelnero, glason da biero!

LA DIFERENCO.

Malmulte inteligenta homo foje demandis la faman poeton Lessing pri la diferenco inter komedio, spektaklo, kaj tragedio.

Lessing respondis : — Ke vi tion ne scias, tio estas por mi komedio, por la ĉeestantoj ĝi estas spektaklo, kaj por vi mem — tragedio...

Laŭ melodio amata :

Eltomba saluto

(Itala popodemelodio: « Finestra che lucevi ed or non luci ».)

Fenestro hara ne plu lumigata,
Vespere preterpasas kaj vespero,
Ne plu en vi sin montras la amata,
Ne plu ŝi loĝas sur ĉi tiu tero.
Ŝi ploris, ĉar ŝi estis sola devis,
Do Dio ŝin al la anĝeloj levis.

En la tombeja paco kaj trankeblo
Konsolon serĉas mi. Jen — rava floro —
Gi min salutas kun radia brilo,
Kreskinta el entomba ŝia horo.
Kaj pli kaj pli ekfloras ĝiaj carmoj,
Ju pli sur ĝin gutas miaj larmoj.

Karl VANSELOW.

Rido Sanigas

MEKSIKAJO.

Post grava ofendo reciproka, du meksikanoj decidis pistole dueli, sen sekundantoj, en arbaro malproksima je kelkaj kilometroj. Ambaŭ alvenas al la loka stacio, kaj la unua mendas bileton por iro kaj reveno, dum la dua nur mendas bileton por iro.

« Kial », diras la unua, « vi ne mendis bileton por iro kaj reveno? Ĉu vi estas jam certa pri via venko? »

« Tute kontraŭe », respondas la alia, « por la reveno mi kutimas utiligi la bileton de mia duellanto, ĉar li ĝin ne plu bezonas. »

LA EKZAMENO : TESTAMENTO.

— Kio estas bezonata por testamento?
— Mortinto kaj postlasaĵo.

LA EKZAMENO : NEREKTAJ IMPOSTOJ.

— Kio estas nereka imposto?
— Nu, imposto por hundoj, ekzemple.
— Kial?
— Ĉar ĝin ne pagas la hundo.

VARBU! PROPAGANDA!

VARBU!

per la verda stelo - per sigelmorkoj - per flugfolioj - per anoncoj kaj artikoloj de la gazetaro - per paroladoj - per libroj - per kursoj! — Sed... la plej efika varbilo el ĉiuj restas

LA UZADO DE NIA LINGVO !

Internacia Esperanto-Ligo

Centra Oficejo : Herosgate, Rickmansw rth (Herts.), Anglujo.

OFICIALA INFORMILO

N-ro 118. 10an de Majo, 1939.

NOVAJ PERANTOJ.

Bulgario : St. Minkov, 129 rue Sredna Gora, Sofia.

Slovakujo : Ministerstvo dopravy odd. II/3, Bratislava.

al kiuj membroj en la koncernaj landoj povas pagi la kotizojn.

NOVAJ DELEGIOTJ.

Francujo
Gien (Loiret). D : M. Chailloux, 69 Rue Bernard Palissy.

Lille (Nord). D : M. Volqueman, 36 Rue Turgot.

Madagaskaro
Antsohihy. D : R. Martin, Adjoint des Services Civils.

Svedujo
Eslov. D : E. Eriksson, Kanalĝatan 10.

Falkopding. D : N. Sigurd, Berzeligatan 17.

SANGOJ.

Brazilo
Bauri. (Sao Paulo). D : adr. sŝanĝo : Rua 1 de Agosto, Vila Noroeste No. 7.

Britujo
Birmingham. FD (Asekuro) : adresaĝo : 244 Quinton Road, Harborne, Birmingham 17.

Francujo
Vienne. Pro la bedaŭrinda morto de S-ro Uline provizore ne estas D.

Hindocinujo
Haiduongo. D. vakas.

DUMVIVA MEMBRO.

Aligis kiel Dumviva Membro : F-ino C. Williams, Papiro.

JARLIBRO. Ĝi estis preta je Pasko, kaj tiutempe estis ĉe la presejo la adresitaj etiketoj por la dissendo al la pagintoj. Malgraŭ oftaj plendoj malfianke la presistoj te mairapide dissendis la ekzemplerojn. Ili informis nin, ke ĉiuj foriris antaŭ la fino de Aprilo. Se tiu, kiu jam pagis la kotizon, ne ricevis ĝin, li bonvolu sciigi tion al ni.

Cecil G. GOLDSMITH, Generala Sekretario

Leterkesto

Germanajn abonantojn ni denove atentigas pri la leterkesta noto en n-ro 16 (1021). Se vi troviĝas inter la tie cititaj, bonvolu tuj skribi al ni, se tion vi ankoraŭ ne faris, aŭ tuj pagi vian abonkoton al la tie indikita konto: alie ni devos supozi ke vi ne plu deziras ricevi Heroldon. La samideanoj ne menciitaj en n-ro 16 komprenble ne skribu.

L. F. en O. kaj D. J. L. en H. Se vi ne ricevis iun numeron, petu ĝin senĝene, kaj ni tuj denove ekspedos ĝin, ankaŭ se la ricevivo kulpas ne ni, sed la poŝto, aŭ alia faktoro.

Reklamantoj aŭ petantoj de iuj numeroj bonvolu cifere indiki la numerojn deziritajn. Do, ne skribu : mi ne ricevis la lastan, aŭ antaŭlastan numeron, — sed : mi ne ricevis numeron 10, aŭ 15, aŭ 22... Ne skribu : mi deziras ricevi ekzempleron de la numero kiu enhavis la artikolon de s-ro Q., — sed : mi enhavis ricevi ekzempleron de numero 43 el la jaro 1938 (se ankoraŭ havebla). Se vi reklamatis iun numeron, kaj ni sendis ĝin denove, kaj poste vi konstatis ke vi tamen jam ricevis ĝin kaj nun posedas ĝin duoble, **ne resendu** sed prefere donu la duoblan ekzempleron al iu konato. Vi eventuale povos per ĝi varbi novan abonanton, aŭ novan esperantiston; sed por ni unu ekzemplero ne signifas perdon, des malpli, ĉar reklamadoj dum la lastaj jaroj estis tre malfortaj.

Parolas la leganto

TURISMAJ PROSPEKTOJ.

Rilate al la artikoloj en n-ro 17 mi volas atentigi pri tio ke certe pluraj pli frue ĉeĵur urtoj posedas ankoraŭ grandan kvanton da esperantlingvaj prospektoj. Pri tiuj de Plizen (Pilsen) oni jam kelkfoje atentigis. Estas certe ke ankaŭ Karlsbad posedas ankoraŭ amason da Esperanto-prospektoj. Tial estas utile ke samideanoj el la tuta mondo ankoraŭ petu ilin senpage de : Kurverwaltung, Karlsbad (Sudetengau), Germanujo. Ankaŭ britoj, francoj ktp. petu la esperantlingvan prospekton, kvankam tre certe ekzistas ankaŭ angla-kaj franc-lingvaj. Mi persone ĉiam preferas la esperantlingvajn, ĉe se ekzistas prospektoj en mia nacia lingvo, ĉar mi konstatis ke tiuj nacilingvaj prospektoj ofte enhavas tiel ridigajn erojn gramatikajn, ortografajn, kaj tiajn sencensigajn vortmiksajn ke pli volonte mi rezignas ilian legadon... J. de H.

« FLAMANDO » AŬ « FLANDRO » ?
Pro peto de kelkaj samideanoj mi prezentas al vi « lingvan » demandon, kiu mi volonte vidus solvita pere de Heroldo : Kiel oni devas traduki la vorton « Vlaming » ? Iuj diras « flamando », aliaj « flandro ». Kiu el ambaŭ vortoj estas oficiala, aŭ la pli uzenda ? A. C.

Rim. de red. — Ni ne scias, ĉu unu el ambaŭ vortoj estas oficiala; sed preskaŭ ĝenerale (almenaŭ en libroj kaj gazetoj) oni trovas la formojn « flandro », « flandrujo ». S-ano A. C. mem uzis por sia letero papieron de Flandra Ligo Esperantista. Ekzistas Flandra Parto de la « Belga Antologio », el la flandra lingvo ĵus tradukis Hector Vermuyten poemojn de Guido Gezelle, ktp. ktp.

Ni recenzas

J. B. Gresset : Ver-Vert. Poemo en kvar kantoj, el franca lingvo tradukis Celestin Roussseau. 32 p. 13x21 cm. Prezo 4 fr. Eldonis : Esperantista Centra Librejo, Paris.

Gustidire tio ne estas poemo sed rakonto pri papago kiu vivis en monahinejo, estis same habilema kaj same pia kiel la monahinoj sed — post kelktaga ŝipvojaĝo — forgesis ĉiujn piajn parolojn kaj anstataŭe lernis blasfemiojn kaj malĉastajn. Kiam, punite, ĝi (la verketo nomas ĝin « li ») refariĝis pia kaj ree estis dorlotata, pro subita transiro « de longa malĝaja dieto al amaso da sukeraĵoj, supersatigita je dolĉaĵoj » li mortas.

Spirita, iom satira rakonto, bone tradukita. Min nur ĝenis la konservado de francaj « Odyssee, Énée » ktp. anstataŭ Odiseo, Eneko. Kaj kial « Tecló » anst. Teklo ? Ĉu oni povas diri « la pentinta birdo finfine refariĝis si (ĉu ne : li ?) mem » ? M.

★

Elin Pelin : Kvar rakontoj. Tradukis el bulgara lingvo kun permeso de l' aŭtoro At. D. Atanasov (Ada). 31 p. 12x16 cm. Prezo unu resp.-kupono. Havebla de la aŭtoro, adre. : Gladston 48, Sofia, Bulgario.

Kvar rakontoj de konata verkisto. La du unuaj prezentas (kiel skribas la tradukinto en antaŭparolo) « humore kaj en ioma grado sarkasme momentoj el la vivo de l' monaĥoj ». La tria priskribas la antaŭgiton kaj malĝojon de ediniĝonta instruisto. La kvara denove estas sarkasma skizo, ne pri monaĥoj sed pri advokato.

La traduko estas bona ; sed min ĝenis du-triŝaj manko de subjekto pronoma en dependaj propozicioj, kaj umfoje erara uzo de « ĝis ne » anstataŭ « dum ne » (Al virino dispremu la kapon, ĝis ne estos maltrua). M.

★

D-ro Maurits Sabbe : Vaina koro. El la flandra lingvo tradukis D. Mortelmans. 26 p. 13,5x19,5 cm. Prezo 5 belg. frankoj. Eldonis : Katolika Esperanto-Instituto, 17, Egied Segerslaan, Wilrijk, Belgio.

Unuakta teatraĵeto por kvar personoj, prezentata la batalo de juna fratino por sia amo kaj amato kontraŭ geonkioj kiuj havas pri tio alian opinion; sed la onkino poste aliĝas al ŝia flanko, kaj fine ankaŭ la onklo estas venkita. Drameto taŭga por esti prezentata, kaj ne nur de katolikaj rondoj.

Bedaŭrinde la stilo diversloke estas tre frazeja (kompreneble pri tio kulpas la originalo), kaj tio ne akcelas facilan paroleblon. Restis ankaŭ, malgraŭ ke la Korektolegon prizorgis kvar samideanoj, pluraj pres-kaj aliaj eraroj, ekz. : Tiun koleterversadon tuj forpasos. — Ĉiam ja sufoki kion volas ekilori... k. a. M.

★

Litovaj popolkantoj. Tradukis kaj kolektis P. Lapienė. 40 p. 15,3x23 cm. Prezo 1.00 lid. Eldonis : Litova Esperanto-Asocio, Kaunas.

En aŭtuno 1938 aperis ampleksata kolekto « El litova poezio », de la sama kompilito. « Litovaj popolkantoj » estas represojo el tiu pli ampleksa kolekto kiu enhavis ankaŭ multajn specimenojn el la arta poezio.

La jena libreto prezentigas en plaĉa aranĝo, kun diversaj iniciatoj kaj vinjetoj, arte desegnitaj, sur kiuj nur iu regule revenanta simbola figuro misformita kaŭzas strangan, eĉ timigan impreson.

La kantoj estas specimenoj de tipe popola poezio, plejparte tre simplaj, ofte simbologiaj; kelkaj estas veraj perloj. Estus bone, se la esperantistaro vaste interesigis pri tiuj folkloraj verkoj, kaj se similaj kolektoj povus aperi pri ĉiuj popoloj.

★

Besuchet das schöne Sudeten-Deutschland — Vizitu la belan Sudet-Germanujon ! Tio estas la teksto de glumarko, varbanta en la lingvoj germana kaj esperanta por la nomita provinco. Interesulo povas ricevi kvanton kontraŭ unu resp.-kupono (germano) kontraŭ poŝtmarko de 0,15 mk.) de : Bruno Gahler, Talstr. 3, Gablonz (Sudetengau), Germanujo.

Solena jubileo en Vilno

« Universo » en Vilno festis la 21. 4. sian 10-jaran jubileon per t.n. « Akademio ». La salono de la Juda Teknika Liceo estis plena de esperantistoj kaj simpatuloj. Post malfermo, la blorvestro komencis la « Akademion » per la himno. Sekvis interesa prelego de la prezidanto D-ro D. Fajŝtejn : « Kial Esperanto venkos? ». S-ro K. Geršater prelegis pri la esperantista movado en Vilno dum la lastaj 15 jaroj kaj atingis la « Universo » sur la verda kampo. Sekvis laŭleĝo de granda nombro da koraj, kuraĝigaj telegramoj kaj grupaj de multaj societoj kaj unuopoj el diversaj landoj. Poste la muzika kaj deklama parto.

En la sama vasta salono estis aranĝita unua en Esperantujo ekspozicio ilustranta la judan partoprenon en la Esperanto-movado kaj literaturon, por centoj da objektoj: gazetoj kun koncernaj artikoloj, broŝuroj, libroj originaj kaj tradukitaj, periodaj eldonaĵoj kaj fotoagrajaj. Aparta tablo estis destinita por la judaj verkistoj, kies verkojn oni tradukis esperantlingven. Krome la ekspozicio enhavis parton « Mne-moniko per Esperanto », ilustranta per amaso da leteroj, dankesprimoj kaj recenzoj el ĉiuj anguloj de l' mondo la praktikan aplikon de Esperanto ĉe la esperantista perkorrespondanta sekcio de Mnemonika Instituto de D-ro D. Fajŝtejn en Vilno.

Presejo de Belga Esperanto-Instituto K. S. Lange Leemstraat, 127, Antverpeno, Belgio.

Je la memoro de fidela amiko :

S-ro Johannes KARSCH

Je la memoro de Johannes Karsch, estinta vicprezidanto de UEA, pri kies forpaso ni informis en nia numero de 30. 4., ni ricevis ankoraŭ la jenan mallongan nekrologon de liaj Dresdenaj amikoj :

La 14. 4. 1939 finiĝis la laborriĉa vivo de nia ŝatata kaj kara s-ro Johannes Karsch en Dresden, post longa malsaneco, kaj antaŭ la fino de lia 58-a vivjaro.

De post « La Kvara » en Dresden 1908 li dediĉis sian tutan vivon al nia afero, temperamente kaj entuziasme kiel li estis, senlace laborante per tuta koro dum jardekoj por UEA ĉe gvidanta posteno, same kiel dum multaj jaroj kiel estro en nia iama Loka Grupo Dresden de Germana Esperanto-Asocio. Sed tiu ĉi sama Esperanto rompis lian koron. Ni — liaj amikoj — jam dum la tuta lasta jaro sciis ke ne nur lia korpo sed ankaŭ lia animo eĉtis malsana, kaj lia morto estis tragika en tempo, kie subkusas lia dum la tuta vivo amata Esperanto, en « la mond' eterne militanta ».

Li, konata de multaj internaciaj kongresoj, estis pioniro por ideala afero. Ni neniam forgesis lin kaj lian multegan laboron kiun li dum 30 jaroj oferis por sia ĝis la morto amata idealo. Li ripozu en paco!

Por liaj amikoj : G. K.

FENTO STANLIFF :

Longeco de vortoj

Kalkulante la longecon de difinitaj vortoj en la Plena Vortaro, oni trovas la sekvantan tabelon. Sed oni povas prave plendi ke ĉiu vorto en la vortaro ne estas egalofte uzata, kaj pro tio, la dua kolono de procentaj signoj montras la oftecon de vortoj en naŭ hazardo trovitaj paĝoj en la Originala Verkarlo de Zamenhof. Ankaŭ oni povas plendi ke en ĉiutaga vivo oni ne uzas la lingvon laŭ tia formalo stilo. Bedaŭrinde ne estas kolekto da interparoloj de Zamenhof por statistiko. Tamen la tabelo da montras la oftecon en la akcentitaj vokaloj sur vortoj difinitaj en la vortaro. Notu la kompareblajn proporciojn :

1-silabaj	0/0	0/0
2-silabaj	1.33	38.00
3-silabaj	25.62	33.53
4-silabaj	40.13	18.18
5-silabaj	23.11	7.42
6-silabaj	7.60	2.48
7-silabaj	1.70	0.39
8-silabaj	0.32	0.00
8-silabaj	0.09	0.00
Entute	100.00	100.00
Akcento sur a	0/0	21.93
— e	21.40	30.18
— i	30.18	14.98
— o	14.98	9.66
— u	9.66	0.72
— aŭ	0.72	0.60
— aj	0.60	0.16
— ej	0.16	0.37
Ĉiu alia sono kune	0.00	0.37

Libroj antaŭmilitaj malkare

En nia stoko troviĝas ankoraŭ kvanto da libroj el la antaŭmilita tempo. Tiuj libroj plejparte ne estas indikitaj en nia Katalogo. Kelkaj el ili supozeble estas jam malfotaj. La plimulto de ĉi tiuj libroj estas ankoraŭ en bona stato; nur kelkaj estas negrave difektitaj. Ni proponas ilin por la sekvantaj prezoj; sed ni liveras ilin nepe nur kontraŭ antaŭa pago, kaj sen plia rabato. Se la mendito restas sub 1.— guldono, aldonu 0,10 guld. por sendkostoj. Se la mendito atingas aŭ superas 1.— guldono, ni liveras, ne kalkulante sendkostojn. La prezoj estas en guldonoj, po ekzemplero.

12 Tolstoj : Princo Serebrjanij. Historia romano, 223 paĝoj	1.50
4 Graven : La kamena angulo. Dramo, 49 p.	0.30
3 Gordon : Kara panjo. Komedieto, 35 p.	0.30
6 Houssaye : La reĝlandoj de l' rozoj, 38 p.	0.25
6 Slowacki (trad. Grabowski) : La patro de pestulo en El-Arish, 22 p.	0.20
4 Chateaubriand : Aventuroj de l' lasta Abenceraĝo, 47 p.	0.25
2 Aventuroj de la Kalifo Harun an Raŝid, 32 p.	0.25
5 Arpad : Mallongaj Rakontoj, 44 p.	0.25
7 Gorski : Ruĝa Floro. Rakonto, 24 p.	0.15
5 Paruski : La vakcinujo krono. Novelo, 30 p.	0.20
2 Gogol : Portreto. Rakonto, 85 p., ilustr.	0.50
2 Literaturo Almanako 1909, 92 p., ilustr.	0.50
1 Literaturo Almanako 1910, 73 p., ilustr.	0.50

HEROLDO DE ESPERANTO, SCHEVENINGEN (596)

La libroj de Literatura Mondo,

de Eldona Societo Esperanto, de Esperantista Centra Librejo, de Brita Esperantista Asocio, de Esperanto Publishing Company, de Moravia Esperanto-Pioniroj, de Itala Esperantista Federacio, de S. A. T., de J. Muusses, ktp. estas haveblaj ankaŭ de nia Librofako, Kun plezuro ni atendas viajn mendojn.

HEROLDO DE ESPERANTO SCHEVENINGEN (NEDERLANDO).

Anoncetoj

Honorigo. D-ro Robin en Varsovio, prezidanto de la Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio, estas nomita « Korespondanto de la Pariza Medicina Societo » por siaj tre ŝatataj verkoj koncerne la gastrologion. — Tre sinĉeraj gratuloj!

30-jara jubileo. Tiel maloftan jubileon festis la 20.5.1939 la Esperanto-grupo « Kompenado faras pacon » en Haarlem, Nederlando. — Nian koran gratulon!

Hotel du Nouveau Monde, 98 rue de Cléry, Paris 2. Centro de Paris, ĉe grandaj bulvaroj. Fluenta varma kaj malvarma akvo en ĉiuj ĉambroj. Prezoj : 18.00 ĝis 35.00 fr. nokte. — Rendevuo de Esperantistoj.

Gejuuloj kaj pacamantoj! Kuraĝigu novan klason! Poŝtkartojn kaj leterojn sendu tuj al la Pacinstituta Esperanto-Grupo, Schaufeller College, Cleveland, Ohio, Usono. — Ĉiu skribinto ricevos personan respondon kaj institutan bulleton.

Ku kunmarŝos? Du junaj samideanoj deziras libretempoj marseante aliande kun ne-angloj, 5-12 aŭgusto. Interesatoj skribu al : 104 Haddenham Rd., Leicester, Anglujo.

Dana ĝardenisto deziras korespondi kun samideanoj tutmonde per angla, germana aŭ Esperanta lingvoj. Verner Nielsen, ĉe Brdr. Hansen, Sŝus, Danlando.

Nekatalikoj senpage povas ricevi informojn pri la katolika kredo ĉe la « Internacia Katolika Informejo », Fraterhuis, de Vliert, 's-Hertogenbosch, Nederlando. (526)

La memoron plifortigas D-ro D. Fajŝtejn, Vilno (Pollando), Zarvalna 15. — Postulu senpage detalajn prospektojn de mnemonika perkorrespondanta kurso en Esperanto! (590)

Rotarianoj! — Skribu tuj al Rotary International Convention, Cleveland (Ohio), Usono, kaj sugestu ke oni pretigu Esperanto-servon por eksterlandaj kongresanoj. Kunvenontoj bonvole senhezite sin anoncu al la Cleveland' a IEL-delegito. (591)

Fumantoj! — Vi povos tuj ĉesigi fumadon, uzante « NEOSTOM ». Ĝin vi povas aĉeti, sendante 30.— italan lirojn al egalvaloron al « Istituto Chimico Terapico », Via Giacchiala, Verona, Italujo. (592)

Al kiu ni iru? Al Kristo! Radio-prediko de fama usona pastro. Menu de : Lutheran Center, Detroit, Michigan, Usono. (Respond-kupono.) (595)

Atentu! Kongresanoj, irontaj al aŭ revenontaj de Bern kaj trapasontaj la malnovan Goethe-urban Frankfurt a. M., estas petantaj sin turni al C. Barthel, Wöhlerstr. 14, Frankfurt a. M., Germanujo, — kiu volonte helpos ilin kaj montrus al ili la urbon. (593)

BES-Adresaro (nova, 13-a eldono), kun centoj da adresoj de esperantistoj el pli ol 40 landoj, kaj kun 84 portretoj, estas ricevebla por 0.60 gld (inkl. sendkostoj) ĉe : Heroldo de Esperanto, Schevevingen, Nederlando. (523)

Oni povas mendi ĉe la Librofako de Heroldo la jenajn librojn (nepe nur antaŭpago, ĉar la libroj estas ekspeditaj el alia loko, kaj ni ne povas aldoni fakturon) : Tutmonda Adresaro de la Esperantistoj 1938, kun pli ol 5000 adresoj el 106 landoj; prezo gld. 0.90 aŭ 7 resp.-kuponoj; Prelejoj el Somera Universitato (64 paĝ.); prezo gld. 0.90; Albumo de Wien kun pli ol 100 bildoj kaj Esp.-klarigoj; prezo gld. 0.90; « Tra Aŭstrio » (80 paĝ. ilustr.); prezo gld. 0.60 aŭ 5 resp.-kup. — La prezoj enhavas la sendkostojn. (573)

Atentu! Por akceli la eldonon de mia libro « Tra Eŭropo per Esperanto », mi proponas favorpreze parton de mia helna Esperanto-biblioteko (i. a. malfotajn librojn kaj gazetojn) kaj duonpreze mian « Bulgaran Antologion ». Liston sendas nur al seriozaj aĉetantoj; Ivan H. Krestanov, publicisto, str. 6, Septemvri 2, Sofia, Bulgario. (584)

DENOVE HAVEBLA

estas la 128-paĝa, tre klare presita, kaj eleganta broŝurita volumo, kiu aperis en 1935 sub la titolo

La Multkolora Libro

Ĝi estas eldonita laŭ iniciato de japana samideano Kenji Tachibana, kaj ĝi enhavas 58 plej variajn legaĵojn de diverslandaj aŭtoroj : rakontojn, popularsciencajn artikolojn, versojn, spritaĵojn, sentencojn, ktp. do ion por ĉiu gusto, en lingvo modela kaj plurfoje kontrolita. Ankaŭ nomita « La intelekta legolibro ». Prezo nur 0.75 gld., inkluzive de sendkostoj. Mendo ĝin ĉe la eldono « Heroldo de Esperanto », Harstenhoekweg 223, Schevevingen, Nederlando, aŭ ĉe alia Esperanto-librovendisto! (563)